

ESPERANTYSTA

POLSKI

POLA ESPERANTISTO

Kuneldonantoj:

S-oj: Prof. D-ro Odo Bujwid, D-ro L. Chybczyński, M. Czerwiński, Jan Günther,
D-ro A. Nauman.

Protektoroj-subtenantoj:

S-oj: L. Bogusławski, S. Essigman, A. Grabowski, Kielca Soc. Esp., J. Loth,
R. Maske, A. Zakrzewski, D-ro Leon Zamenhof.

Helpantoj:

S-oj: J. Chankowski, D-ro Gelibter, B. Jabłkowski, A. Koziara, B. Radzi-
miński, D-ro W. Róbin, B. Szczepankiewicz, J. Tejchfeld, R. Vogel, H. Wie-
rzechowski, D-ro A. Zamenhof, F. Zamenhof.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio: Varsovio, Śopena 8, telefono 160-24.

Prezo 20 kop.

„Esperantista Polski“

W ROKU 1913

będzie wychodzić regularnie co miesiąc w 16-stronicowej objętości o urozmaiconym programie.

Roczna prenumerata z „Dodatkiem literackim“ 2 rb. 50 k. z przesyłką pocztową.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio: Warszawa (Polujo) Śopena 8.

„Pola Esperantisto“

EN 1913 JARO

aperados ĉiumonate en 16 paĝa amplekso kun diversigita programo kaj „literatura Aldono“

Jar-abono kun la „literatura Aldono“ rb. 2.50 = S 2.65 kun poŝta trasendo.

Cena ogłoszeń

na okładce:

Cała II strona, 4-o szpaltowa . . . rb. 32.—
„ III i IV po „ 25.—
Wiersz petitowy, jednoszpaltowy
na II-ej stronie . . . rb. —.20
„ jak wyżej na III i IV stronie „ —.15

Najmniejsze ogłoszenie 1 rb.

Od ogłoszeń stałych lub kilkakrotnych ustępuje się odpowiedni rabat.

Prezo de anoncoj

sur kovrilo:

Plena II-a paĝo, 4-kolona rb. 35.—
„ III k. IV paĝoj po „ 22.—
Unu linio petita, unukolona, sur II paĝo „ —.20
„ „ „ sur III k. IV paĝoj . „ —.15

Plej malgranda anonco kostas 1 rb.

De konstantaj aŭ kelkfojaj anoncoj estas de kalkulata konvena rabato.

Sensacio en esp. literaturo!

EL PARNASO DE POPOLOJ

Jubilea libro de esperanta poezio kaj de ĝia Majstro, s-ro ANTONI GRABOWSKI.

Ĝi estas 240 paĝa, bela volumo kaj enhavas tre abundan kaj plenan kolekton de poemoj originalaj kaj majstre tradukitaj dum 25 jara literatura agado de s-ro Grabowski —
el 30 lingvoj.

Ĝi estas vera antologio de tutmonda poezio.

La unikan libron devas posedi ĉiu amanto de belo, poezio, ĉiu organizanto de esp. koncertoj, ĉiu deklamanto aŭ kantisto kaj fine ĉiu esp. grupo.

La prezo de la libro estas:

1,00 Sm.; kun sendelspezoj — 1,15 Sm.: luksa eldono sur plej bela papere kun portreto de la aŭtoro — 2,00 Sm. kun trasendo — 2,25 Sm.

La libro estas senpage aldonata al ĉiu abonanto de „Pola Esp.“, kies jarabono kostas 2,65 Sm.

Rapidu do aboni „Polan Esp.“ aŭ mendi la libron aparte. — La mendojn oni sendi al Red. Pola Esp. Varsovio, str. Śopena № 8.

X a Universala Kongreso de Esperanto en Paris — 1914.

L A M O V A D O

L'Esperantiste Français

Oficiala Organo de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto.

Publikigas informojn pri la organizado de la X-a Kongreso, la Pariza vivado kaj aliaj plej interesaj aferoj.

Aperinte, en la daŭro de kvin jaroj laŭvice, sur 4, 9, 12, 16, 20 kaj nune 24 paĝoj (granda formato: 23×33, kun ilustraĵoj) la **Movado** estas la plej granda el ĉiuj esperantistaj gazetoj, laŭ la vidpunkto materiala kaj unu el la ĉefaj plej interesaj laŭ vidpunkto morala.

Ĉiuj gesamideanoj, precipe la estontaj gekongresanoj, devus do legi ĝin.


Jara abono: Francujo fr. 2.50, Alilando fr. 3.20 (Sm. 1.300).

Sendo de la lasta numero kontraŭ unu Internacia respondkupono.


61 Boulevard St. Marcel, Paris 13-a.

POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Novembro 1913

WARSZAWA—VARSOVIO

Jaro VIII — Nro II (79)

Esperanto i handel.

W chwili, kiedy przy schyłku roku daje się zauważyć większe ożywienie w sferach handlowych, kiedy nowe życie wstępuje we wszystkie gałęzie pracy ludzkiej, nie od rzeczy będzie powiedzieć słów kilka o Esper., genialnym tworze Dr. Zamehofs, który stopniowo ogarnia cały teren pracy i wiedzy ludzkiej.

Ruch esperancki, bez zaprzeczenia, z każdym dniem potęguje się.

Jeżeli weźmiemy pod uwagę rezultaty, osiągnięte przy małej stosunkowo propagandzie, dojdziemy do następującego wniosku: zrobiliśmy wiele dla chwały idei, dla której pracujemy, ponieważ największe uczeni nas zrozumieli. Dziś widzimy między esperantystami panujących, członków różnych tow. lub instytutów, senatorów, deputowanych, sędziów, adwokatów, oficerów, awiatorów, inżynierów, profesorów, studentów, budowniczych, handlowców, urzędników i t. d.

A to chyba dosyć...

Nie powinniśmy jednak ustawać w drodze. Tembardziej powinniśmy się starać o rozszerzenie dobroczynnego wpływu naszego dzieła, powinniśmy je propagować na wszystkie strony, a szczególnie tam gdzie się ono może okazać najbardziej użytecznym:—w przemyśle i handlu.

Jakież to sympatyczne i zajmujące środowisko dla nas! Z kim najbardziej można mówić o zadaniach ekonomicznych bez obawy, że nie będziemy zrozumiani, jeżeli nie z handlowcami utrzymującymi nieustannie stosunki z zagranicą.

Przemysłowcy, starając się nieustannie o polepszenie swego bytu przez handel, dołożą wszelkich starań, aby dla łatwiejszego

porozumienia się wzajemnego wprowadzić język pomocn., a propagandę rozpoczną od swoich gorliwych pracowników: urzędników i robotników.

I chętnie przyswoją sobie język międzynarodowy wszyscy ci współpracownicy handlowi, wiedząc z doświadczenia, że nieznanomość języków obcych naraża ich na nieporozumienia i różne nieprzyjemności.

I nauczą się esper. handlowcy wszelkiej kategorii, podróżnicy, urzędnicy handlowi, — nie chcąc zamykać swoich operacji handlowych w ciasnych granicach swego kraju i rozumiejąc dobrze jak wiele zapewni im korzyści rozszerzenie terenu działania. I stanie się Esperanto narzędziem handlu i przemysłu.

Skierujmy zatem nasze usiłowania i dobre chęci w stronę handlu i przemysłu, bądźmy nauczycielami handlowców; starajmy się wpoić w nich przekonanie, że mają pewny sposób polepszenia sobie bytu materialnego; przemysłowcom zwróćmy uwagę, że z punktu ekonomicznego brak sposobu porozumienia się narodów sprowadza niesympatje i konflikty, kiedy przeciwnie, łatwość wzajemnego rozumienia siebie — to ogniwo łączące narody, to dobrobyt i szczęście ogólne.

Takie zadanie stworzyła sobie Sekcja handlowa i przemysłowa Grupy Esperantystów w Paryżu.

Sekcja ta stara się o rozwój jęz. esper., w handlu i przemyśle, daje cudzoziemcom możliwość korespondowania i zawiązania stosunków handlowych bez znajomości języka franc., ułatwia stosunki z każdym miastem obcym, gdzie tylko istnieją grupy esperanckie, słowem pośredniczy i ułatwia wszelkie sprawy handlowe i przemysłowe.

Leży więc w interesie wszystkich handlowców, urzędników lub robotników aby się przyłączyć do ruchu esperanckiego.

My zaś, propagatorzy obecni, bądźmy ludźmi czynu i starajmy się udowodnić w praktyce ile rozwój esp. daje korzyści nietylko nam ale i ogółowi.

Jeżeli chwilami praca wyda się nam trudną, pomyślmy o naszych poprzednikach, o tych którzy są naszymi mistrzami i niech oni będą dla nas przykładem; naśladowajmy ich: „Dajmy trochę, aby zyskać wiele“.

Piszmy, zwiedzajmy, starajmy się przekonać, nie żałujmy czasu i trudu.

Propaganda w tym kierunku jest zadowoleniem dla siebie, a spełnieniem obowiązku względem innych.

Jest to praca doniosłego znaczenia, praca socjalna, gdyż służy całemu społeczeństwu.

Oby ludzkość przez długie wieki zbierała wdzięczne plony z naszej pracy na tej niwie!

L. E. Decaen.

LIBERA TRIBUNO.

Unuigo de esperantistaj societoj.

La ideo pri rajtigataj delegitoj, kiu siatempe faris tian bruegon, kiu elvokis tiom da diskutoj kaj da diversaj opinioj, laŭ decido de IX-a Berna Kongreso enfine enkorpiĝas sub la formo *Asocio de Esperantistaj Societoj*.

Ne pridiskutante en ĉi tiu artikolo la statuton de tiu asocio kaj ne tuŝante detalojn de la unuigo, ni volas nur vidigi al niaj legantoj eventualan perspektivon kaj utilon de la Asocio.

Estas publika sekreto, ke plejparto de niaj societoj nur vegetas. Al tiuj ekzistajoj mankas forte batanta koro kaj viviganta ĝin sango. Neniel estas kulpa ĉi tie Esperanto, kiel intelektuala movado kaj kiel ne sufiĉa bazo, ne sufiĉe interesa objekto por societa vivo. Ne! Esperanto malkovras tian grandegan kampon por diversflanka agado kaj pasigado de tempo, ke sendube ne ekzistas homo, kiu ne trovos en bona esperanta societo ion por si. Komercisto trovos (aŭ devas trovi) komercan fakon, kolektanto — kolektan, amanto de literaturo — literaturan, por simpla amuzanto societo devas esti distr-ejo k.t.p. Ĉu ne?

Kaj ankaŭ vasta devas esti kampo de ekstera propagando de la societo. Kurso sekcio, jurnalista, prelega, tradukista — devas diversmaniere laŭ sia celo propagandi Esperanton. Nature, ke tiel organizita societo estus ja idealo kaj idealoj estas tiel malfacile akireblaj. Tamen celi pliperfektigon de io neperfekta estas ĉies devo.

Kio do estas kulpo de tia stato de la societoj?

Unue — laŭ ni — mankas al la societoj homoj energiaj kaj sciantaj agi. Sindonemo sola ne sufiĉas; oni devas scii kiamaniere

aranĝi, agi kaj gvidi. Kie lerni tion? Kie sciigi pri agadmanieroj?

Jen al tiuj demandoj devas respondi Asocio de Esp. Societoj, se ĝi volos esti kvazaŭ supera gvidanto de niaj tutmondaj societaj aferoj.

Nuntempe niaj societoj similas ŝipetojn el nuksa ŝelo vagantaj sur la oceano sen direkto, sen lumturoj, sen spertaj direktistoj. La societoj-ŝipetoj scias nur, ke ili naĝas al „verda haven“ de l' homaro“, kiel diras nia poeto, sed ofte ili naĝas laŭ volo de ventoj kaj sorto.

La Asocio — ni volus supozi — havos rolon esti kvazaŭ centra stacio de senfadena telegrafo interliganta ĉiun ŝipeton-societon kaj gvidanta ĝin, helpante per siaj konsiloj.

Ni estas eble tro postulemaj por komenco, sed ni opinias, ke tiujn diversajn malfacilaĵojn nespertojn de societo-gvidantoj, helpos kaj forigos la Asocio pere de bona, tre bona, speciala gazeto por societoj.

Ĝisnuna, tre ŝatinda Oficiala Gazeto Esperantista, en nuna sia formo tute ne respondus al tiu celo. La speciala porsocieta gazeto devos enhavi ne nur oficialajn raportojn, sed ĝi devas doni al societoj: pretan materialon por societaj legadoj aŭ diskutoj, ĝi devas instrui pri diversaj manieroj de propagando en diversaj medioj, presi pretajn propagandajn artikolojn por tradukontoj. La gazeto devus presi intersanĉoj de spertoj, akiritaj de propagandistoj, presi pretajn prelegojn pri Esperanto, tradukotajn en naciajn lingvojn, unuvorte, ĝi devus doni tutan pretan materialon por diversfaka vivo de la societoj.

Ĝi estu kvazaŭ unu numero de *journal-parlé* por ĉiumonata societa kunveno.

Ne estas dubinde, ke kun helpo de tutmondaĵ societanoj, tia gazeto, abonota de ĉiuj societoj kaj grupoj, estus aranĝebla.

Tiam malfeliĉaj prezidantoj de la societoj ne turmentus (ofte vane) la kapon por elpensi ion por la programo de la kunveno. Ĝeneralan programon donus la gazeto mem.

Restus nur diskutoj pri lokaj cirkonstancoj kaj kondiĉoj de la societo.

Eble iu diros: „Ah, ankoraŭ unu gazeto!“ Jes! Ankoraŭ unu, sed nepra kaj ĝis nun ne ekzistanta.

Sed... ni atendu pacience la estontecon.

0.

Malnova sed ankoraŭ nova demando.

En „Lingvo Internacia“ el 1896 jaro (N^o 8) ni trovas tiun ĉi artikolon kaj, ĉar la demando „Kion traduki“ estas ankoraŭ nun nova kaj ne sufiĉe kontentige solvita ni represas la artikolon, esperante ke ĝi aljetos ion daŭro sur tiun demandon. Sendube, ke nun ŝanĝiĝis cirkonstancoj kaj pliriĉiĝis nia literaturo, sed ĝis nun oni ne povas trovi ian orientiĝon aŭ pli ĝuste respondon, kio estas tradukinda, kaj kio ne. Tiel opiniigas nin multo de aperantaj tradukitaj senvalorajoj.

La artikolon ni represas senŝanga, do la legantoj povos kompari Esperanton antaŭ 17 jaroj kun la nuna, kiu cetere restis kaj restos *la sama, senŝanga*.

KION TRADUKI?

„Antaŭnelonge mi konatiĝis kun la lingvo Esperanto, kiu tre plaĉas al mi. Mi tre deziras esti utila al la lingvo kaj laŭforte helpi al ĝia progreso. Sed mi havas tre malmultajn konatojn kaj nenian talenton paroli antaŭ la publiko. Mi estas malriĉa kaj ne povas helpi materiale. Talenton de verkisto mi ankoraŭ ne havas, sed mi povus ion traduki kaj tiamaniere akceli la sukceson de nia kara Esperanto. Tamen mi ne scias, kion mi devas elekti por la tradukado, por ke mia laboro ne estu senutila kaj ne perdiĝu vane. Mi esperas, ke Vi ne rifuzos konsili al mi ian verkon por la tradukado. Mi povas traduki el la lingvoj rusa, franca“...

Kredeble multaj esperantistoj havis la okazon ricevi leteron de pli-malpli simila enhavo. Kredeble la aŭtoro de nia lingvo ricevas centojn da similaj leteroj.

Kion traduki? Mi scias, ke en nia esperantista mondo ekzistas diversaj opinioj pri tiu ĉi demando.

Unuj pensas, ke oni devas traduki nur la verkojn de gloraj aŭtoroj, kies nomoj estas enskribitaj per grandaj literoj en la historion de l' tutmonda literaturo kaj kies verkoj faris epokon en la spirita vivo de l' homaro.

Aliaj opinias, ke ni tute ne devas traduki „glorajn“ verkojn. Tiuj ĉi verkoj ja estas tradukitaj kaj retradukitaj preskaŭ en ĉiujn lingvojn de l' tera globo kaj ĉiu povas tralegi ilin en sia patra lingvo, se li ne tralegis ilin ĝis nun. Ni devas traduki la verkojn de naciaj junaj talentaj verkistoj, sufiĉe konataj en sia patrolando, sed ne sufiĉe konataj en aliaj landoj. Tiam niaj tradukoj estos legataj kun intereso kaj prezentos novaĵojn por multaj esperantistoj.

Triaĵ diras, ke oni tute ne devas traduki beletristikon, ĉar nia lingvo estas antaŭ ĉio lingvo de scienco, industrio kaj komerco. Klera homo de kia ajn nacio ĉiam trovas por si sufiĉe da leginda beletristika materialo, da prozo kaj da versoj, en sia parenca lingvo. Li tre malmulte bezonas internacian lingvon kaj internacian literaturon. Sed la scienculo kaj komercisto ne povas ne senti bezonon je la lingvo internacia, ĉar li devas ofte komunikiĝi kun eksterlandanoj. Oni devas sekve traduki sciencajn kaj teknikajn traktatojn, modelojn de komercaj cirkuleroj kaj leteroj, anstataŭ perdi tempon kaj fortojn por beletristiko.

Kvaraj iras ankoraŭ pluen kaj diras, ke oni entute ne devas perdi tempon kaj elspezi monon por tradukoj, kiam ni ne havas ankoraŭ bonajn lernolibrojn kaj detalajn vortarojn en ĉiuj gravaj lingvoj. Ili diras, ke literaturaj kaj sciencaj tradukoj estas nur amuzilo aŭ ludilo por kelkaj dekoj da esperantistoj, kaj ke bonaj lernolibroj kaj vortaroj estas ne amuzo, sed afero grava kaj utila, kiun bezonas ne sole esperantistoj, sed ankoraŭ la tuta homaro, se ni volas esperantigi ĝin. Klamaniere ellernos bone nian lingvon la hispano, se lia lernolibro estas malgranda kaj plena da eraroj, kaj se li ne scias ian lingvon krom hispana? Kion faros italo kun sia mallonga lernolibro kaj mallongega vortareto, rumano kun sia vortareto sur unu folieto da papero, ĥino aŭ japano, turko aŭ armeno, ne havanta

eĉ tion? Sekve ni forjetu eĉ la penson pri literaturaj tradukoj, ĝis ni donos al ĉiu nacio almenaŭ unu bonan lernolibron kaj detalajn vortarojn.)*

Kiu estas prava? Mi opinias, ke ĉiu kaj neni, kaj mi penos nun pravigi mian opinion.

Ĉu efektive ni ne devas zorgi pri la kresko de nia traduka literaturo kaj devas dediĉi ĉiujn fortojn al la verkado de lernolibroj kaj vortaroj? Mi pensas, ke malgraŭ la graveco de l' bonaj lernolibroj kaj detalaj vortaroj, ni ne povas kaj ne devas limigi nian agadon nur per tiuj ĉi specoj de l' literaturo. Mi pensas tiel, ĉar mi scias, ke la plej bona lernolibro kaj la plej detala vortaro ankoraŭ ne faras lingvon. Lingvo vivanta devas ja vivi, kaj lingvo vivas, kiam oni ĝin uzas, ĝin parolas kaj skribas en ĝi. Lingvo latina jam ne vivas, malgraŭ bonegaj kaj multegaj gramatikoj kaj la plej vastaj detalaj lernolibroj. Komprenoble oni povas uzadi la lingvon eĉ kiam ĝi estas morta, oni povas nun ankaŭ skribi kaj paroli en lingvo latina, sed ni ja ne deziras aferi kun rigidiginta malvivulo; ni rajte preferas florantan kaj progresantan lingvon-vivulon, plenan da fortoj. Sed mi ne parolos plu pri tiu ĉi klara afero, ĉar mi riskas paroli trivialaĵojn. Ni devas zorgi pri vortaroj kaj lernolibroj, ĉar tiuj ĉi vortaroj kaj lernolibroj prezentas vojojn, laŭ kiuj la popoloj iras al nia lingvo-konstruado: ĉiu nova lernolibro malfermas novan vojon al nova popolo, — sed ni zorgu ankaŭ, ke nia konstruado estu bone aranĝita, ornamita, kaj meblita, ĉar se la nove venintaj loĝantoj ekvidos nur nudajn murojn, ili baldaŭ forkuros de ni, eĉ se nia konstruado estos modelo de l'arto arkitektura; ni zorgu sekve pri nia literaturo, ni verku kaj traduku.

Sed . . . kion traduki? Traduku kion vi volas, sed zorgu nur, ke la verko, kiun vi elektas, prezentu ian „internacian“ intereson kaj literaturan indon — tute egale, ĉu glora aŭ neglora aŭtoro ĝin verkis. Ĉiu popolo posedas verkojn, kompreneblajn nur por ĝi mem. Tiuj ĉi verkoj tuŝas tre specialajn flankojn de l' societa vivo, kaj eksterlandano, kiu ne scias tiujn detalojn de l' vivo kaj historion de l' popolo, trovos en simila verko nenion rimarkindan, nenian intereson. Provu legi al la aliurbano la folietonon de via loka gazeto, la folietonon, en kiu oni sprite kaj brile parolas pri la lokaj „demandoj de l'

tago“. Kredeble li diros al vi: „la folietono estas tre sprita, sed mi ne komprenas tri kvaronojn en ĝi, ĉar mi scias nek s-ron N., kiun mckas via folietonisto, nek la friponaĵon de s-ro M., pri kiu li aludas, nek la agojn de s-ro L., kiujn li rememoras“. Ĉiu popolo havas verkojn, similajn al tiaj folietonoj, kaj tiel same preskaŭ nekomprenablaj por ali-landanoj, kiel la folietono pri lokaj interesoj de l'urbo estas nekomprenbla por aliurbano. Tiujn ĉi verkojn ni komprenoble ne devas traduki. Ĉio alia meritas tradukon, se ĝi entute meritas atenton. La verkoj de gloraj eminentaj aŭtoroj ankaŭ devas esti tradukataj, malgraŭ tio, ke oni jam tradukis ilin en naciajn lingvojn. Al mi ŝajnas, ke ni havus tro bonan ideon pri la homoj, se ni pensus, ke ĉia klera homo jam tralegis ĉion, kion skribis la genioj de l' plumo. Kontraŭe! Homo, kiu tralegis ĉion eminentan, kion kreis la grandeguloj de la literaturo, komencante de Homero kaj finante per la nunaj verkistoj de ĉiuj nacioj — tia homo estas tre *rara avis*. Ĉiu bona verko trovos legantojn, kaj ĉiu leganto, kiu ne povas legi la originalon, devas preferi la tradukon en Esperanto eĉ kompare la tradukon en sia propra lingvo, ĉar esperanta traduko povas esti pli preciza, pli proksima al la originalo, ol la traduko en lingvo nacia. Mi legis „Hamleton“ en rusaj tradukoj, sed neniam el la plej bonaj rusaj tradukoj de „Hamleto“ donis al mi tiom grandan plezuron, kiel la bonega esperanta traduko.

Inter la verkoj de Heine, Ŝiler, Ŝekspir, Byron, Molière kaj aliaj troviĝas kelkaj, kiujn mi ne havis la okazon tralegi, kaj mi atendas ke oni tradukos ilin en nian lingvon. Ni ne forgesu ankaŭ tiun cirkonstancon, ke tradukante glorajn verkojn, ni faras plej bonajn kaj konvinkajn provojn de nia lingvo. Lingvo, kiu transdonas belecojn kaj spriton de „Faust“, forton de „Kain“, trankvilecon de „Iliado“ — tia lingvo ne povas esti kruda kaj netaŭga.

Sed tradukante glorajn verkojn, ni ne forgesu pri la verkoj malpli gloraj, sed pli interesaj por nia tempo, ni ne forgesu ankaŭ verkojn sciencajn kaj teknikajn. Mi ne povas konsideri, kio estas pli utila: traduko de ia verko klasika, aŭ de simpla bona rakonto, aŭ de ia scienca traktato. Mi scias nur, ke ĉiu bona traduko estas por ni utila, sed kio estas pli utila — tion mi ne scias. Sed mi iom timas, ke se niaj tradukiŝtoj longe konsideros, kia traduko estas pli utila, ni riskas resti tute sen tradukoj.

V. Gernet.

*) Nuntempe ni ne povas plendi pri ne sufiĉeco de la lernolibroj kaj vortaroj.

CATULLE MENDÈS.

1.

ŜIA BUŜETO.

— Ŝia hararo? — mi demandis.

— Ŝiaj haroj — respondis Valentino — similas nek brilon de la oro, nek radiojn de la suno, ĉar la oro estas malvarma kaj la suno malhela, sed ili estas gajaj kaj radiantaj, kaj brodigantaj la fingrojn, kaj blindigantaj la okulojn, jen helaĵ, kiel *soterno*, jen flavaj, kiel malnova konjako, iom pluen ili kurbiĝas kiel fajraj serpentetoj, ili, kiel granda brulego estas kunigitaj en harligon kaj de ili fluas tia potenco kaj ebriliganta aromo, ke vere nur la diablo povus krei tiajn harligojn — la diablo, vestiganta la korteganinojn kaj kombanta belajn knabinojn por la homara maskbalo — per la flamo de sia infera fajro, ĉe kiu pentas la Volupto.

— Ŝia frunto? — mi demandis.

— Ŝia frunto! — diris Valentino — ĝi estas mallarĝa kaj pala, kvazaŭ la neĝrubando, kiun ŝi metis super la brovoj, por malvarmigi la ardon de ŝtelvenanta deziro.

— Ŝia nazo? — mi demandis.

— Ŝia nazo! — respondis Valentino — mi al ĝi dediĉis tiun ĉi sensencan versaĵon:

Kiel pont' sur monto pinta
Estas ŝia nazo bela,
Aŭ kiel bird', levinta
Voston al lazur' ĉiela.

— Ŝiaj okuloj? — mi demandis.

— Ŝiaj okuloj! — diris Valentino — se oni engutus en la koron de brilanta topazo guton da brilanto, kie dormetas koncentrita, blindiga brilo de la stelaro, la topazo eble similus ŝiajn okulojn.

— Ŝiaj vangoj? — mi demandis.

— Ŝiaj vangoj! — respondis Valentino. — Ĉar ĝi estas juna knabino kaj krom tio parizanino, ŝi aldonas al sia haŭto revon de ŝmirajo. Naiva kaj delikata, ĝi estas freŝa kaj kolorigita. Al natura velureco de haŭto ŝi aldonas dorlotajojn de la kosmetiko. Al tiu, kiu tuŝas ŝian vangon, ŝajnas, ke li trinkas nektaron de sovaĝa rozo, kiun oni kolorigis.

— Kaj ŝia buŝeto? — mi demandis.

Valento konfuziĝis.

— Ŝia buŝeto... — li respondis. -- Mi ĝin apenaŭ vidis.

— Vi ĝin apenaŭ vidis?

— Jes, certe, — li ekkriis — ĉar mi ĉiam ĝin kovradis per la kisoj.

2.

LA AMO.

La tuta reĝolando estis profunde ĉagrenita, ĉar depost la vidviĝo de la reĝo, tiu lasta tute forlasis okupojn pri la regno kaj tagojn kaj noktojn pasigis antaŭ la portreto de sia mortinta edzino.

Ĉi tiun portreton li mem pentris; kaj por tio li speciale studis pentrarton, ĉar por la edzo, kiu tiel flame amis, kiel li, estus dolorige permesi, al allulo fiksi sur la tolo amatajn trajtojn.

La pentristoj havas specialan manieron pririgardi la modelon; ĉi tiu maniero tute ne plaĉas al jaluzemaj edzoj kaj krom tio la pentristoj ne pentras ĉion, kion ili vidas; ili lasas ion por si mem, en siaj okuloj; eble eĉ, en la koro.

Tiel pensis la reĝo, kaj li povis tion permesi por nenio en la mondo.

La portreto estis sola lia konsolo, li ne povis ĝin rigardi sen larmoj, kaj tamen li sangus sian ĉagrenon je neniaj plezuroj de la vivo.

Vane venadis la ministroj kaj respekto-plene raportis:

— Via reĝa moŝto, al ni venas maltrankviligaj sciigoj, ke nova reĝo, Ormuzo, kolektas nekalkuleblan armeon por nin ataki.

La reĝo estis indiferenta al iliaj raportoj kaj senĉese rigardis la portreton de sia amata edzino.

Sed, unufoje, matene, lin atakis la kolerigo kaj li apenaŭ sin detenis de la mortigo de unu el siaj ĉambelanoj, ĉar tiu lasta respekte kuraĝis al li aludi, ke jam estas la tempo por doni al la regno novan reĝinon, ĉu el reĝa dinastio, aŭ simplan vilaĝaninon.

Neeble! — ekkriis la reĝo furioze. — Kial vi al mi kuraĝas konsili tian hontindaĵon? Sekve, mi devas perfidi la memoron pri unu el miaj amataj reĝinoj? Iru for, aŭ vi pereos de mia mano! Sed antaŭ ol foriri vi sciu kaj al ĉiu anoncu, ke nenla virino suriros mian tronon, se ŝi ne similos tiun, kiun mi perdis, se ŝi ne estos plene simila al la portreto de la mortinta reĝino.

Dirante ĉi tiujn vortojn, la reĝo sciis, ke li nenion riskas, ĉar kie do en la tuta mondo troviĝus la virino, kiu povus ŝin egali, ŝin la solvirinon! Ŝi estis la beleco mem; la naturo ne kreas dufoje la ĉefverkon.

Ha, por ĉiam malaperis profundaj nigraj okuloj, mirindaj; ebonkoloraj haroj, tiel longaj kaj ombrecaj, ke ili ŝin kovradis kvazaŭ mantelo kaj ŝin similigadis al diino de nokto; malaperis pala, alta frunto kaj bela buŝeto kun ĉarma rideto, montranta du vicojn da brileblankaj dentoj. Ne, nenio simila estas trovebla en la tuta mondo! Eĉ la reĝidino, ĉe kies lulilo ĉiuj bonaj feinoj metus siajn plej valorajn donacojn, ne povus havi tiajn ombrecajn harojn, tiajn profundajn okulojn, ŝi ne povus posedi similan fronton, nek similan buŝeton.

II.

Forpasis monatoj, fluis tagoj kaj jaroj, sed la ĉagreno de la reĝo ne malpligrandigis.

Sciigoj pri Ormuzo fariĝis pli maltrankviligaj. Tamen la reĝo tute ignoris la danĝeron. La ministroj je nomo de la reĝo pligrandigis la militimpostojn, sed anstataŭ armigi la armeon, ili metis monojn en la proprajn poŝojn kaj la lando, paginta grandegajn impostojn, estis malfermita por eniro de la avida mal-amiko.

La malkontento konstante pligrandigis, jam pli ofte staradis antaŭ la palaco popolamaso kun plendoj aŭ petoj.

Sed, frapita de la ĉagreno, la reĝo zorgis pri nenio, esceptante la portreton, kies ĉarmoj kun nevenkebla forto lin katenis.

Sed foje okazis en la frua mateno, ke kiam la reĝo venis al la fenestro, li ekaŭdis de malsupre ies kanton. Ĝi estis la voĉo freŝa kaj ĉarma, kiel matena kanto de la alaŭdeto.

La reĝo ekmiris. Li alpaŝis al la fenestro, sin alpremite al la vitro li rigardis malsupren kaj ne povis sin deteni de ekkrio pro ravo. Ne, neniam li vidis ion pli belan, ol la juna paŝtistino, kiu tie malsupre pelis brutaron al la herbejo.

Ŝi estis tiel hela kaj radiantata, ke ŝajnis, ke la haroj origas la sunon, sed ne de ĝi ili estis origataj.

Sia mallarĝa frunto estis rozkolora, kiel ĵus ekflorinta sovaĝa rozo; la okuloj estis helaj, kiel ĵrua mateno, la buŝeto estis tiel malgranda, ke eĉ kiam ĝi estis malfermita por la kanto, oni povus vidi nur kelkajn perlajn dentetojn.

Sed malgraŭ sia raviteco la reĝo rapidis for de la fenestro kaj kovris la vizaĝon pro la honto, ke li eĉ por la momento povis forgesi sian amatan, mortintan edzinon. Li poste fleksis genuojn antaŭ la portreto, plorante pro

senkonsola ĉagreno kaj li ne plu rememoris, ke preter lia fenestro trapasis kun kanto la paŝtistino.

— Ha! — sopire li diris. — Vi ja scias, ke mia ĉagrenita koro ĉiam apartenos al vi. Neniu virino povas vin simili! Ili volas, ke mi donu al ili novan reĝinon, sed mi nur tiam povas konsenti, kiam via portreto reviviĝos aŭ al mi malsupreniros.

III.

Kiam morgaŭan tagon la reĝo rigardis la portreton de sia amata edzino, lin vizitis la melankolio. Li ekpensis kaj al si mem diris:

— Strange, ĉu vere en la ĉambro estas malseke? La bildo forte malheligis. Mi ja bone memoras, ke la reĝino ne havis tiajn malhelajn harojn, kiel tiuj sur la portreto. Jes, certe, ili ne havis koloron de ebono, mi klare memoras, ke en ili estis enplektitaj orkoloraj haretoj. Al diino de lumo estis simila mia edzino, sed ne al tiu de nokto.

Tuj li ordonis alporti paletron kaj pentrilaron kaj baldaŭ li reparis tion, kio estis difektita de la nokta humideco.

— Dank' al Dio! — li ekkriis. — Jen denove ili estas bonodoraj, la oraj haroj, kiujn mi amis senkonscie kaj kiujn mi eterne amos!

Kaj plenigita je feliĉo kaj sopiro, li genufleksis antaŭ la portreto, kiu nun plene similis la reĝinon kaj li denove ripetis siajn jurojn pri la amo kaj fideleco.

Sed, certe malbona spirito kun li ekŝercis, ĉar post tri tagoj li denove riparigis la portreton,

— Kiu tion faris? — li diris maldolĉe. — Kiu kuraĝis tuŝi per peniko la portreton de mia reĝino. Kies do estas ĉi tiu alta, pala frunto? Mi havas ja bonan memoron, kaj mi scias, ke ŝia frunto estis freŝa kaj rozkolora, kiel ĵus ekflorinta sovaĝa rozo.

Per peniko li metis la orajn harojn iom malsupren kaj rozkolorigis la fronton.

Nun li estis tute kontenta, kaj lia koro tremis pro la amo, rigardante ŝanĝitan portreton.

Ho, ve! Morgaŭan tagon okazis io pli malbona. Nun li klare komprenis, ke ia malbona spirito lin ekscitas:

— Kiamaniere do povus tiel forte ŝanĝiĝi la okuloj kaj la buŝo!

Ne, neniam lia amatino havis similajn nigrajn okulojn, similan grandan buŝon, el kiu ĉiuj dentoj estas videblaj.

Ne, ne! La okuloj, kluj iam lin milde rigardis, estis helebluaj, kiel matena ĉielo, kaj la buŝo estis tiel malgranda, ke eĉ kiam kanto, kiso aŭ rido malfermis la ruĝajn lipojn, tiam nur kelkaj malgrandaj perlaĵ dentetoj estis videblaj.

La reĝo ĉagrenplene rigardis la portreton, kiu tiel forte frapis liajn plej korajn rememorajojn.

Ho, se li kaptus ĉi tiun malican sorĉiston, ĉar certe nur la sorĉo ĝin faris, li terure vengus al li ĉi tiun malbonan petolajon!

Sed la sorĉisto forestis kaj tuta kolerego de la reĝo estis direktita al la bildo. Iom da tempo ankoraŭ trapasis kaj li estus disŝirinta la bildon, li piedpremus ĉi tiun mensogeman portreton. Sed iom post iom, lia kolero forpasis, ĉar la bildo estis riparebla.

Li eklaboris, li pentris el memoro kaj tiel bone ĝin sukcesis fari, ke, post ia tempo, freŝa knabina vizaĝo — kun bluaj okuloj kaj kun malgranda buŝeto — lin gaje salutis el la kadro.

Kun sopira ĝojo la reĝo rigardis la bildon kaj malĝoje li diris:

— Jes, jen estas ŝi, tia ŝi estis mia amata neforgesebla reĝino!

Kaj kiam unufoje la ĉambelano, kiu rigardis tra la ŝlosiltruo kaj ĉion vidis, proponis al la reĝo edziĝi je juna paŝtistino, preterpasanta ĉiumatene preter la palaco kun sia brutaro kaj konstante kantanta, ĉar ŝi vere plene similis la portreton ĉe la bela — la reĝo silente klinis la kapon..

*Al F-ino Linka R. dediĉas
la tradukinto M. Horbaczewski.*

LEOPOLD STAFF.

HODIAŬ MIN...

Hodiaŭ min matena
De birdoj vekis kri'
Kaj bril' de bona, suna oro...
Sub arboj paŝas mi
Tra rosa kamp' serena,
Sed ne sopiras jam la koro...

Ŝi ami min ne ĉesis
Je ĉiu paŝ' kaj far',
Forflugis sonĝa iluzio...
Ne unu pasis jar'
Jam ĉion mi forgesis,
Kvankam sensange restis ĉio...

Radias sun' la sama,
Bird' kantas dum printemp':
Sopiro estus jeĉ sufiĉa,
Por reviviĝu temp'
Pasinta, kiun ama
Feliĉo plektas malfeliĉa...

Ho, kara! Ond' forportas
Memoron jam pri Vil
Oni forgesas — temp' ne longe daŭras!
Kiel bedaŭras mi,
Ke tiel ĉio mortas,
Ke jam eĉ vin mi ne bedaŭras...

Tradukis, dediĉante al Stefanja M.
Juljan Tuwim.

ĈE KALIKO DE „CHARTREUSE“

Jen antaŭ mi kapeto Greuz'a,
Jen perle brilas vin' Chartreus'a,
Insidas peko en la vido,
Argente sonas ŝia ridol...
Jen antaŭ mi la ĉarmo, miro
Kaj al la kisoj — buŝ-sopiro!

Post mi malplenaj vin-pokaloj,
Velkantaj de la roz' petaloj,
De la flugiloj milda bruo,
Esperoj vanaĵ, viv-enuo,
Post mi pereas sonĝoj, ĉarmoj,
Post mi dolor', sopiro, larmoj...

trad. M.

Heroaĵo aŭ frenezo?

En № 8 de „Pola Esperantisto“ estas presita traduko de artikolo de Aŭgusto de Villiers: „Heroaĵo de Doktoro Hallidondhil“. En tiu ĉi artikolo Doktoro Hallidondhil estas nomita heroo, grandanima fanatikulo de Scienco, kaj lia kruela faro—sublima mortigo. Certe tiu-ĉi artikolo indignis min. Kian teruran tempon ni travivas, ĉe sensencan kaj krue- lan mortigon oni opinias sublima!

Ekzistas la moralaj veraĵoj, kiuj ne bezonas pruvojn. Al tiuj veraĵoj apartenas la percepto: „ne mortigu!“ Sekve ĉia mortigo estas krimo, sed precipe la plej terura krimo estas la mortigo ne atendita, subita, el malantaŭe de angulo. Tia estas la krimo de Doktoro Hallidondhil. Esenco de la krimo estas sekvanta. Aperas al la Doktoro la paciento. Tiu trovas ĉe li nesaniĝeblan malsanon kaj donas al li la konsilon, ne havante ian esperon de resaniĝo. Sed post kelke da monatoj la paciento revenas al la Doktoro tute resaniĝinta, en floranta sano. Tamen la Doktoro, anstataŭ ĝoji kun paciento pri la resaniĝo, subite mortigas lin ĉe si en kabineto kaj tuj faras aŭtopsion por vidi, kiamaniere devenis proceso de la resaniĝo.

Ĉu oni povas dubi pri frenezo de la Doktoro? Tute ne, alie oni devus lin konsideri la konscia mortiginto de sia paciento, por kiu li devas esti amiko, sed ne malamiko. Kio fariĝus, se karacistoj mortigus siajn resaniĝintajn pacientojn, kies resaniĝo ŝajnas al ili ne komprenebla, enigma? Estas klare, ke tio-ĉi estas absurdo, kaj tiam la pacientoj apenaŭ turniĝus al science instruitaj kuracistoj, kiuj ilin povas konscie mortigi por eksperimento. La pacientoj ne estas ja bestoj, kiel kunikloj, klujn la eksperimentanto metas sur la vivisekcian tablon laŭ sia memvolo. Oni ne povas senpune rompi kaj inverti la moralajn leĝojn. Kuracisto, kiel amiko de homaro, devas esti gvidanto ne nur de pure sciencaj veraĵoj, sed ankaŭ de moralaj. Nun ni rigardos de pure scienca flanko tiun-ĉi krimon. Tio, kio estas trovita en aŭtopsio de la paciento de la Doktoro, estas ob-

jektiva, senduba faro. Sed tio, kion la Doktoro trovis ĉe li en komenca esploro, estas la faro tute subjektiva. Ĉu la Doktoro uzis ĉiujn diagnostikajn metodojn por konvinkiĝi ke la malsano estas mortiga, ne saniĝebla? Certe ne: li ne faris la esploron de sputo, ne esploris malsanulon per rentgenaj radioj k. t. p. „Tik! tik! plafi!“ kaj tio estas la tuto. Kian do sciencan ŝataĵon prezentas la donitaĵoj, trovitaĵoj ĉe la aŭtopsio de la paciento? Absolute nenian. Ne okazas mirakloj en la mondo. Se la pulmoj de la paciento estis detruitaj, ili ne povis resaniĝi, sed la paciento resaniĝis,—sekve ili ne estis detruitaj. Restas unika konkludo: la Doktoro eraris en diagnozo. Erari povas ĉiu; nur tiu ne eraras, kiu nenion faras. Sed, anstataŭ honeste konscii sian eraron, la Doktoro memfide opinias sian diagnozon,—ricevitan per vojo pure subjektiva,—ne kontestebla. Tio-ĉi jam estas nepardonebla eraro, se la Doktoro havis sanan intelekton. Obstine ne konsciante sian eraron, la Doktoro mortigas sian pacienton,—tio estas jam terura krimo kiel antaŭ scienco, tiel antaŭ moraleco kaj homa sento. Argumento „malkaŝi la sekreton savigan por degenerita branĉo de spirvojoj“ ne povas lin senkulpigi, ĉar por malkaŝi tian sekreton estas unika vojo: aŭtopsio post natura morto.

Post ĉio dirita oni ne povas dubi, ke la Doktoro estas malfeliĉa frenezulo, kaj, verŝajne, tiu-ĉi malfeliĉo trapis lin subite.

„Dediĉi sian konsciencon al sia devo“ por mortigi—tio estus terura krimo, se ne estus frenezo. Jen kial mi donis la titolon al mia artikolo: „Heroaĵo aŭ frenezo?“ Nenia heroaĵo, sed pura frenezo!

Lublin.

D-ro V. V. Tihomirof.

Nian opinion pri tiu-ĉi afero ni prokrastas permesante al niaj legantoj—precipe al doktoroj—esprimi iliajn vidpunktojn je tiu „heroaĵo aŭ frenezo“, kaj je ĝenerala temo: „Ĉu oni povas dediĉi vivon de individuo por bono de homaro“?

Red.

SE VI VOLAS AKIRI
PER MALGRANDAJ MONRIMEDOJ HEJMON, PRODUKTEMAN TERPECON kaj SEN-
DEPENDECON skribu al „Kalifornia Esperanta Komunumo“ (K-E-K) 620 Ivy Ave. „P“,
San Francisco, U Ŝ A.



PRINCO JÓZEF PONIATOWSKI.

La Batalo de popoloj.

Cent jarojn pasis ĵus de fatala „batalo de popoloj“ ĉe Leipzig. Por ni, poloj, ĝi estas funebra festo: 19-an de Oktobro 1813 j. pereis dum tiu sangoplena, terura tago pol-nacia Heroo, amata princo Józef Poniatowski. Ĝis lasta guto de sango, ĉirkaŭita de areto da bravaj polaj militistoj, li batalis pro vivo aŭ morto kun potencaj fortoj de la malamikoj, li batalis por tiu, kiu promesis al poloj—Pol-

ujon! Princo Józef Poniatowski, kvazaŭ satelito de tragedia planedo de Napoleono, lastfoje tiam ekbrilis radie kaj estingiĝis, metante funebtron sur ĉiujn polajn korojn. La stelo de Napoleono paliĝis. Tiam estingiĝis ĉiuj niaj esperoj kaj estingiĝis ĉiuj logaj, belaj promesoj de Napoleono, kiu malavare pagadis per ili la maron de pola sango por li elverŝita.

K o n s i d e r u !

REGU VIN MEM!

„Pruvu al mi, ke vi scias regi vin mem — diras S-ino Oliphant — kaj tiam mi diros al vi, ĉu vi estas bonedukita homo; se vi tion ne scias, la tuta via kulturo ne multe valoras“.

La homo, ne scianta sin regi, plenumos nenian gravan agon.

Manko de ĉi-tiu virto pereigis multegon da kapablaj homoj, kies laboro povus esti tre fruktodona.

Preskaŭ ĉiutage la gazetoj anoncas pri la okazintaĵoj, ke homoj en kolero plenumas la agojn, kiuj ilin pentigas dum la tuta vivo.

Demandu malfeliĉajn loĝantojn de la mal-liberejoj, kiom kostis al ili ilia rapidemo, ne bridita en la decidiga momento. Kiom da ili pagis per la libero de la vivo unu solan momenton de kolero!

Fulmorapide ektondris malfeliĉiga pafo aŭ ekbrilis klingo de la ponardo kaj la amiko ne plu levigos, la Krime estas plemumita.

Ne unu sola homo disrompis sian karieron, perdis la okazon unikan dum la tuta vivo sole pro nescio sinregi. En momenta kolerego li ruinigis la aferon de tuta vivo, li propravole baris la vojon al la feliĉo.

En momento de kolero homoj similas bestojn, vekantajn indulgon, kiu limas kun malestimo.

Nenia artisto sukcesus verki la tragedion en kiu ĉeflokon okupus aro da malicaj pasioj malamo, venĝo, jaluzo, kaj kolero.

Se vi estas inklina al ekkoleriĝo, al iriteco pro ĉiu bagatelajo, tiam por nenio taŭgos via meditado je tia mens-kripleco, la sopirado kaj certigo al vi mem kaj al aliaj personoj, ke nenia estas por tio konsilo. Vi simple devas ŝajni trankvilon kaj sinregadon de la homo, kiun vi volus simili. Tutforte vi al vi sugestiu ke vi ne estas ekkolerema kaj rapidema homo, ke vi ne iritas pro bagatelajoj kaj en ĉiuj cirkonstancoj vi scios konservi mensan egalpezon. Post certa tempo vi ekmiros ĝis kia grado ĉi-tiu memsugestio de trankvilo, sereneco kaj mensa egalpezo vin similigis je via idealo. Ĉar la stato en kiu ni estas, estis aŭ estos en la estonteco — dependas de kvalito kaj intensiveco de niaj pensoj.

La kaŭzo de kolero plejofte estas nerajtigita fiereco, memamo, kaj vanteco, kaj la homo ne reganta tiuj sentojn, ne meritas eĉ a nomon de homo.

Ni bone scias kiel malfacile estas regi niajn sentojn kaj la parolon, kiam la sango alfluas al la cerbo, sed ni same bone scias kiel danĝera, kiel fatala estas sklaveco de la temperamento. Eĉ por la momento homo ne devas forgesi raciajn principojn kaj malsupreniri al stato de besto, kiu en ĝi vekigas en momento de pasio. Similaj ekkoleriĝoj, se ni ilin ne limigas, fariĝas malbona kutimo, kiu frenezigas multajn personojn.

Kiu scias la sekreton de sinregado, regadon de siaj pensoj kaj sentoj, tiu sukcese batalos kontraŭ internaj malamikoj, same kiel kontraŭ la eksteraj. Tiu persono scios, ke kiam la cerbo estas varmegita per la pasio, tiam oni ne devas ĝin bruligi per sinsekva eksplodo de kolerego kaj ekscito, sed oni devas apliki rimedon malvarmigan, en formo de trankvila penso kaj racia rezonado. Tiamaniere ni sukcesos rapide estingi internan brulegon. Kiam brulas domo de la najbaro ni ne alverŝas oleon nek petrolon, sed la akvon. Tamen kiam la infano estas ekscitita, ni tion ne atentante, per nekonvena vorto potencigas la brulegon. Kiom do malpli da malfeliĉo, sufero eĉ da krimo estus en la mondo, se ni de plej juna aĝo al kutimigadus infanojn al regado de agoj kaj sentoj.

Ni, vidante la homon ensuĉatan de la marĉo, el kiu li propraforte ne povus elĝi, kuras lin helpi. Al neniu, certe, venus la penso puŝi lin pli profunden kaj per tio pligrandigi lian danĝeron. Tamen, kiam la homo brulas pro kolerego ni anstataŭ estingi danĝeran flamon, ĝin pligrandigas per konvenaj vortoj. Multaj homoj, ne povantaj regi sian koleron, sentas tamen dankemon al la homoj, kiuj per trankviliga parolo scias malardigi la flamon de la ekscito.

Agante en tia okazo kiel la homo, inda portanta tiun nomon, vi ne sole faras servon al via proksimulo, sed vi ankaŭ plifortigas en la kapablo de sinregado. La homo ne povanta sin regi similas la mariston sen kompasoj, lasitan por dispono de maro kaj ventegoj. Ĉiu ventego de pasio, ĉiu ondo de ekscitita penso ĝin jetas tien kaj reen, ĉiumomente ŝanĝante direkton de lia vojo kaj malebligante veladon al la haveno.

La forto de sinregado estas la fundamento kaj la centro de karaktero.

La kapablo de rigardo en la okulojn de alia homo kun plena trankvilo kaj supereco, plena egalpezo de menso, eĉ en la okazo se ĝi nin treege ekscitus kaj instigus, tiu-ĉi kapablo donas al ni senton de nesuperebla forto. Certeco ke vi plene vin regas, ne sole iafoje,

aŭ eĉ ofte sed ĉiam kaj en ĉiu okazo, ĝi al vi donas indecon, forton de la karaktero, certecon, kiun nenio en la mondo al vi povus doni. Regado de la pasio estos plej supera venko de la potenco, kiun homa penso povas akiri.

Trad. R-o.

La Instituto de Pasteur.

Lastatempe scienca mondo kaj kun ĝi tuta Eŭropo festis 25-jaran jubileon de la instituto de Pasteur.

Ĉi tiu instituto estas la plej bona pruvo de potenco de la scienco, ĝi estas plej potenca pruvo, ke la scienco laboras por forigi turmentojn kaj homan mizeron kaj ke la laboro estas fruktodona.

La instituto estas bonstata kaj havas ĉirkaŭ 400 oficistojn. Ĝi havas plenan aŭtonomion, kiu al ĝi permesas ĝis certa grado havi internacian karakteron. Kaj dank' al tio pri la instituto interesigas kaj ĝin prizorgas tuta mondo. Ĝi nun havas, grandan posedajon de kelkdek milionojn da frankoj, kiun donacis ĉiuj nacioj. Sur la listo de la oferintoj ni trovas: rusan imperiestron, imperiestron de Brazilio, Rotŝildon, bankieron Oziris kaj multajn aliajn.

La fondinto de la instituto estas fama franca scienculo Pasteur, kiu dediĉis tutan sian vivon kaj laboron por defendado de homo kontraŭ malsanigaj bakterioj.

Kiam Pasteur inventis rimedon de kuracado de rabio per inokulo de serumo, tiam oni proponis, por honorigi tiel gravan agon, fondi la instituton, kie la scienculo povus labori pluen por bono de la homaro. La donacoj venadis malavare, antingante la sumon de miliono da spesmiloj. En la jaro 1888 estis inaŭguracio de la instituto kaj tuj en ĝi komenciĝis vigla laboro.

Nelonge post tio d-ro Roux inventis serumon kontraŭ difterito, tiam pariza *Figaro* anoncis monkollekton, kiu donis ĉirkaŭ 400,000 S.

Ĉiu nova invento alportis novajn monoferojn kaj la inventoj estis tre multenombroj.

Jen estas la listo de la plej gravaj. Nocard trovis rimedon por kuracado de tetano kaj turnis la atenton je transportado de frizo de bestoj al homoj. Jenson (Japano) fabrikis serumon kontraŭ pesto. Calmette trovis antidoton kontraŭ mordo de venenaj serpentoj k. t. p.

Nuntempe la instituto fervore laboras super la rimedoj de kuracado de tiel teruraj malsanoj, k. ekz: ftizo, kancero, kaj la vicedirektoro de la instituto, d-ro Mieĉnikov (Ruso), kiu jam delonge famigis pro siaj laboroj en bakteriologio, trovante diversajn tre efikajn laktajn serumojn, nun laboras je forigado de homa internajo la mikroskopan kreskajon, venigantan maljunecon, kiun laŭ ĉi-tiu scienculo oni povas sufiĉe efike malproksimigi.

Laboratorioj de la instituto estas eksterordinare riĉaj. Ĝi posedas grandan menagerion de diversaj bestoj, kiuj estas necesaj por diversaj eksperimentoj kaj por produktado de serumo.

Pariza instituto de Pasteur posedas proprajn fakojn en provinco, eksterlande, en kolonioj kaj ĝi organizas sciencajn ekskursojn.

Nuna direktoro de la instituto estas d-ro Roux, homo de eksterordinaraj meritoj kaj virtoj.

Li estas neprofitema servanto de la homaro, inda direktanto de la instituto, nomita monumento de Mizerikordo.

R-o.

Vortoj virinaj — ventumilo trua,

(proverbo diras japana)

Ili al lafo similas flua,

Sed efektive — ventumilo trua...

Multe en ili da sono brua,

Sed senco? — Serĉado vana!

Vortoj virinaj — ventumilo trua,

(proverbo diras japana).

el „Utoj“ de Remigjusz Kwiatkowski trad. M.

Radiumo savos la homaron.

La scienculoj prikalkulis, ke nur por nelongda tempo sufiĉos la karbo, troviĝanta sur la tero. Ekzemple anglaj karbminejoj elĉerpiĝos post 175 jaroj, kiel konkludis fama angla scienculo Ramsay. La karbprovizo en aliaj landoj sufiĉos ankaŭ por nelonga tempo. Kio do post tio okazos?

Ĝi estas la demando pri vivo kaj morto de la homaro. Kia forto movigos maŝinojn? Ĉu la industria vivo, kiu estas ĉefverko de nuntempa kulturo, devas pereji kaj malaperi? El kia fonto, sen fabrikejoj, la homaro ĉerpas artefaritajn sterkojn sen kiuj la tero ne povus doni tiom da greno, ke ĝi estu sufiĉa por nutrado de pli grandiganta homaro. Ĉi tiuj demandoj forte ĉagrenigas sciencan mondon. La homaro devas trovi novan fonton de la energio, same riĉan, kiel la karbo, ĉar en alia okazo venos ne sole fino por la produktokapablo de la tero, sed tutmonda malsato.

Franca scienculo Karlo Norman prikalkulis, ke post 20 jaroj tute elĉerpiĝos la provizo de la perfekta sterko, liverata al Eŭropo el Ĉili kaj Peru. Kiel oni scias ĝi estas sterko lasata de birdoj. Oni ĝin eksportis de la jaro 1840 komence po 15,000 tunojn jare, nuntempe oni ekspedas al Eŭropo po 250,000 tunojn jare. Kiam mankos la sterko (*guano*) tiam oni devos en pli granda kvanto uzi fabrikitan sterkon. Nutriĝkapablo de ĉi-tiu artefarita sterko estas bazata je ĝia kunigo kun azoto, kiu kun hidrogeno faras kvar kvinonojn de nia atmosfero. Norman kalkulas je 4 milionoj de miliardoj da tunoj, t. e. la kvanton kiun ni eĉ

imagi ne povas. Sekve la materialo, kiu estas necesa por produktado de la artefarita sterko estas eĉ troa, sed kiam tute elĉerpiĝos la provizo de la karbo, kiu do tiam movigos la maŝinojn, kiuj fabrikos la artefaritan sterkon? La agrikulturo estas tute dependa de la industrio. La industrio povas utiligi forton de montaj riveroj, la forton, kiu estas tre potenca, sed ĝis nun malmulte ekspluatata. Sed ĝi sola ne estos sufiĉa por bezonoj de la mondo. Kaj jen en la kritika momento, aperas nova, sorĉa fonto de la energio, radiumo.

Nuntempe ne ankoraŭ klare prezentigas kiamaniere oni povas utiligi radiumon por movigado de grandegaj maŝinoj. Sed estas la fakto, ke ĝi estas potenca fonto de la energio.

Estis prikalkulite, ke unu sola tuno da radiumo sufiĉos por movigado de la ŝipo, provizita je maŝinoj de 15,000 tunoj potencaj, kun rapideco de 15 metroj, dum 30 jaroj. Por ricevi saman rezulton oni devus bruligi 1½ milionojn da centnaroj da karbo.

Tio signifas, ke la radiumo estas fonto de la energio je 1½ miliono pli ol la karbo. Resumante ĉi-ĉion oni povas tute rajte diri, ke penoj de la scienculoj, direktitaj je esplorado de la radiumo, kaj en la unua vico la laboro de pola scienculino Curie-Skłodowska, havas ne sole sciencan signifon, sed gravegan signifon por estonta kulturo de la homaro. La radiumo estos certa savilo por la homaro de sovaĝiĝo sen la industrio kaj de morto pro malsato.

R.

Scienco kaj vivo.

Arto de mortigado.

En Kopenhago oni pri nenio plu parolas, krom pri la inventaĵo konstruita de certa dana inĝeniero. La inventaĵo estas nomata „aŭtomata soldato“.

La aparato konsistas el ŝtala cilindro, kiu en la ordinara stato troviĝas en la alia pli granda cilindro, fiksita vertikale al la tero. Dank al tre moviĝema mekanismo, movigata per la rimedo iom simila al la telegrafado sen fadenoj, la interna cilindro leviĝas je 50 centimetr. supren.

En la sama momento la aŭtomata karabe-

no, kaŝita en la cilindro, disjetas en deziratan direkton 400 kuglojn.

Ĉi-tiuj „aŭtomataj soldatoj“ povas esti movigataj de unu sola persono, okupanta centran punkton en 8--9 kilometroj de defenda limo. Malamiko ne provas ilin rimarki pro granda interspaco, kaj fiksado de ili en la tero tute ne difektas kreskadojn.

La provoj montris ke kelkdek similaj „soldatoj“ facile povas defendi la pozicion kontraŭ atako de kelkaj regimentoj de infanterio Ili havas ankoraŭ tiun bonan econ, ke ili ne povas esti timigitaj kaj disjetas siajn 400 kuglojn ĝis kiam sufiĉos la provizo.

Danaj oficiroj, ĉeestintaj la pruvojn, certigas ke „aŭtomataj soldatoj“ facile povas anstataŭi, en defendado de danĝeraj pozicioj, regulan armeon, kiu povas esti ŝparata por pli senriskaj operacioj.

Kiel oni devas dormi.

Franca doktoro, s-ro F. Marade, publikis la broŝuron, dediĉitan al arto de la dormo.

Oni devas, laŭ la doktoro, dormi sola kaj kuŝigi en la mezo de la lito tiamaniere, ke ĉiuj muskoloj havu necesan apogon. Oni ne devas imiti virinojn, kiuj, certe, pro koke-temo metas la brakon sub la kapon. Tia stato reliefigas trajtojn de la vizaĝo, sed kurbigas la nukon, lacigas muskolojn de la brako kaj de brusto kaj estas kaŭzo de malprofunda, haltata spirado.

La dormo sur la dorso estas neoportuna, kaj laŭ opinio de kelkaj doktoroj, ĝi estas eĉ danĝera, ĉar ĝi malsanigas la vertebraron. La dormo sur la dorso kaŭzas la vekigon kun sento de timo, kun sento de ŝarĝo sur la brusto kaj halucinacion.

Allogaj perspektivoj de dormado sur la maldekstra flanko estas ankoraŭ pli malbonaj. Ili elvokas la kunpremadojn en la regiono de la koro, mallongan spiron, ili haltigas digestadon kaj eĉ la funkciadon de la koro.

Oni ne devas ankaŭ dormi sur la ventro kiel estis la modo en la epoko de dua imperio. Tiam oni konsideris tiun situacion en la dormado tre benefika por la personoj malsanaj je koro kaj suferantaj je atakoj de astmo. Ĝi estis, kiel certigas s-ro Marade, tute erara opinio, ĉar la dormado sur la ventro estas tre malsaniga.

Sekve nur restas unu sola pozicio dum la dormado, sur la dekstra flanko, kiu elvokas neniam malregulaĵojn en la funkciado de homa organismo.

R.

Historia anekdoto.

Fama pentristo Hans Holbein, alkondukita Anglujon de reĝo Henriko VIII, ne amis, ŝe iu malhelpis al li dum lia laboro. Unu angla lordo treege volis ekvidi lin — kaj, malgraŭ opozicio de l'servistaro, li eniris laborejon. La artisto tre kolerigita jetis pentrilon kaj kaptinte lordon je kolumo, forjetis lin post la pardonon. Indignita lordo alkuris al la reĝo kaj diris, ke se Holbein ne estos severe punita, li mem mortigos lin kiel hundon. „Eĉ ne tuŝu lin!“ — ekkriis Henriko VIII — „el sep vilaĝanoj mi povos fari per unu subskribo sep lordojn, sed el sep lordoj mi faros nek unu Holbein'n“.

Trad. *Kazimierz Babiński*.

Klasika ignorado.

Ke francoj klasike ignoras geografion tio estas la fakto al ĉiuj konata. Sed eble ne ĉiuj scias, ke la francoj same bone ignoras historion eĉ... propran historion. Jen estas la amuza fakto, okazinta pro la jubileo de „La Batalo de popoloj“.

Antaŭe — malgranda historia noto.

„Antaŭtage de la unua ĉefa batalo ĉe Leipzig, 13 de Oktobro, alvenis Napoleono en la dekstran flankon kaj anoncis al la armeo, ke Ĉef-estron de 8 korpuso de franca armeo polan Princon Józef Poniatowski, li nominacias Marŝalo de Francujo.“

La militistaro plenarmite aŭskultis la tagan ordonon pri la nominaco; ĉiuj staboj kunigitaj en unu deputacio alvenis antaŭ la Princon por ke gratuli al li la ricevon de bostonego de marŝalo“.

Ŝajnas, ke kono de propra historio estas deviga almenaŭ por la gazetoj. Sed, ho ve. En franca, ilustrita gazeto „*Excelsior*“ № 1072, 22/X 13 j., kie ni trovas fotografajon de monumento starigita al pola heroo, marŝalo de Francujo, princo Józef Poniatowski, kiu pereis ĉe Leipzig, heroo batalante por Francujo; redakcio de „*Excelsior*“ metis jenan subskribon sub la klišajo: „Monument, élevé à la mémoire du general *russe* (///) prince Poniatowsky“, kio laŭvorte tradukite signifas: „Monumento starigita por la memoro de *rusa* generalo princo Poniatowski“. Rusa generalo! tiu, kiu ja batalis kontraŭ la armeoj: rusa, aŭstria kaj germana!

Esti pli ignoranta estas neeble! Tio estas simple analfabetismo en sfero de historio.

R.

El Esperanta Mondo.

DEKA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

Paris 2-10 Aŭgusto 1914.

Cirkulero 2-a

Por ke la „Deka“ bone sukcesu, estas nepre necese, ke la Organiza Komitato sciigu, kiel eble plej baldaŭ, pri la nombro de la kongresanoj.

Pro tio, tuj konigu al la Komitato vian aliĝon laŭ jena adreso:

Deka Kongreso de Esperanto
3, plas Jussieu, 3. Paris, France.

ATENTU!:

Ĝis la 1 de Junio 1914, tiu kotizo estas 15 fr. (10 fr. por familianoj: edzino kaj infanoj).

Post la 1 de Junio 1914, tiu kotizo estos 25 fr. (20 fr. por familianoj).

Eĉ se vi ne estas certa, ke vi povos veni al la Kongreso, tamen tuj aliĝu, ĉar se vi ne ĉeestos, oni repagos al vi vian antaŭpagitan kotizon, deprenante nur unu frankon por ofic-aj elspezoj. Sufiĉos, ke vi tion petos, sendante vian provizoran karton, antaŭ la 1 de Aŭgusto 1914.

Sekve, nenion riskante, vi ricevos grandprofiton, se vi aliĝos antaŭ la 1 de Junio 1914. Sed vi ricevos pli grandan profiton, se vi aliĝos kiel eble plej baldaŭ, ĉar la ĉiumonatan Kongresan Gazeton, ĉiu kongresano (escepte la familianoj) ricevos senpage nur depost la de sia aliĝo.

La unua numero aperos la 1 de Januaro 1914, kaj ĝin ricevos nur la kongresanoj, kies aliĝojn ni estos ricevintaj antaŭ la 31 de Decembro 1913. Ĉar ni presigos precize la sufiĉan nombron da ekzempleroj, al kongresano, kies aliĝon ni ricevos ekz. en Marto, ni sendos la Kongresan Gazeton nur de la 1 de Aprilo.

La Organiza Komitato de la Deka.

ESPERANTO-MONUMENTO.

La loka organiza komitato de la IV tutaŭstria Kongreso, okazonta en Franzensbad, projektas, krei Esperanto-monumenton, dekovrotan dum tiu kongreso. Pro tio la komitato sin turnis al la urbestro de Franzensbad, kiu definitive decidis havigi por tiu celo senpage lokon en la kurparko, kaj preni la monumenton sub sian protekton kaj flegadon, prizorgante ties ornamadon per florkulturo.

Konsiderante, ke Franzensbad estas kuraĉloko ĉiujare vizitata de multaj internaciaj gastoj, oni povas prave konjekti, ke tia monumento simbolizanta la staton de nia afero, estus tre fruktonportanta propagandilo. La prezo de la skulptista verko estus proksimume 3000 kronoj. La urbestro ligis al la permeso la kondiĉon, ke la nomita sumo estu antaŭe garantita per subskribo de pagokapablaj personoj, kiuj solidare davas preni sur sin la garantion por elspezoj por tiu ĉi monumento tiel longe, ĝis estos kolektita sumo, kiun kostas la monumento. Ĝis nun subskribis la liston de garantiantoj dek gesinjoroj: *) La ideo estas nepre konsentinda; la sukceso dependas nur de l'oferemo de niaj samideanoj. Pro tio ni petas ĉiujn samideanojn, ke ili bonvolu helpi la ageman komitaton en realigo de tiu ŝatinda projekto. Helpu do en ĉiu loko, kie loĝas esperantistoj! *Oferu almenaŭ unu kronon!* Sed la ĉefa afero estas, *ke vi ĝintuj oferu!* Ĉar la pretigo de la verko postulas iomete da tempo, kaj ĝi ne estas komencebla pli frue, ol la sumo estos kolektita.

Kiu estas en la feliĉa situacio, ke li povas doni pli, donu malavare.

Mondonacojn oni sendu al la loka kongresa komitato—S-ro J. Hechtl, Franzensbad.

La nomoj de donaciuloj estos publikigitaj.

Bonvolu ankoraŭ kiel eble plej gesamideanoj enskribiĝi kiel garantiuloj, ĉar ju pli da samideanoj enskribiĝos kiel garantiuloj des malpli iĝos la risko, kiun ĉiu garantiulo prenas sur sin.

Ekster tio la kongresa komitato fiksis, ke la konstruado de monumento tiel longe ne estos komencata ĝis ne enskribiĝos 30 da tiaj garantiuloj aŭ minimume estos enpagitaj 2/3 da ĉiuj elspezoj, tiel ke la risko kiun ĉiu garantiulo prenas sur sin estu tre malgranda.

Ankaŭ grupoj kaj societoj estas petataj enskribiĝi kiel garantiuloj.

*) 1) Jaakob Hechtl, r. fervoja sekr. Franzensbad, 2) Eugen Loimann, urbestro, de Franzensbad, 3) Gustav Wiedermann, r. konsilanto, arkitekturo, 4) J. E. Kopp, urb-konsilanto, 5) D-ro Maurus Fisch, kuracisto. 6) Karl Wiedermann, bankiero, 7) Princino Heleno Kopassis el Wien, 8) Erna Ziemand, bienposedantino el Lwow, 9) Karl Hell, r. administristo el Eger, 10) Maria Rosenbeck, instruistino el Appersdorf.

Kroniko.

Anglujo.

Eastbourne.

Okazintan Kongreson de anglaj esperantistoj akceptis la urbestro kaj ĝin oficiale subtenis. Belgujo sendis oficialan reprezentanton.

Londono.

Klubo „Londona Policistaro“ kalkulas nun 70 esperantistojn.

Francojo.

— Dank' al klopodoj de S-ro Cayeux, prezidanto de la grupo Esperantista de Sotteville (Seine), la urbestro unuanime donis la nomon Zamenhof, al unu el la stratoj de la urbo.

— En Francujo nunjare funkcias ĉirkaŭ 400 esp. kursoj.

Hungarujo.

Miskole.

Post prelego de d-ro Gisswein en urbo domo estas aranĝitaj kursoj kun 80 kursanoj.

Koložsvar.

Esperanto estas instruata en filozofia fakultato de loka universitato.

Budapest.

D-ro Lorand instruos Es-ton en Budapeŝt'a reĝa hungara universitato kaj en politekniko.

Italujo.

— En Itala Parlamento S-ro Pascetti parolis pri Es-to. La ministro de Popola Instruo esprimis sian simpatian por Es-to.

— Milana urbestro senatoro Panizzarda esprimis sian simpatian por Es-to.

En Genova okazis esp. ekzamenoj en la kazerno. 7 el la soldatoj, studintaj Es-ton nur 10 tagojn facile interkompreniĝadis kun java samideano, S-ro Altenstadt.

— XIV-a Internacia Kontraŭalkoholisma Kongreso, okazinta en Milano akceptis Es-on kiel unu el oficialaj lingvoj de la Kongreso.

Ukrainujo.

— Ĉe ĵus fermita tutruslanda ekspozicio en Kiev estis aranĝita esp. fako. La klarigojn donis S-ro Levenzon. Ĉe la ekspozicio funkcias la vendejo. Ĝeneralaj enspezoj atingas la sumon de 150 rb.

La societo troviĝas ĉe str. de Puŝkin 12. La kursoj estas sub sperta gvidado de S-ro V. Traĉevskij.

Brazilo.

— La instituto „Polyglotico“ en Rio-de-Janeiro enmetis en sian programon kurson de Esperanto.

— La gazetoj: „Gazeta da tarde“, „Correio da Manha“ kaj „O Clarim“ kaj multaj aliaj enmetas priesperantajn artikolojn.

Japanujo.

— En urboj Yokoska kaj en Kamakura estis aranĝitaj du prelegoj pri Es-to.

Ĉeestis pli ol 250 urbanoj.

— En multaj japanaj gazetoj (int. al. „Sagami-Ĉuuro-Ŝinbun“, „Yokoska-Ŝinbun“) aperis gravaj poresperantaj artikoloj.

Aŭstralio.

En ŝtato Quensland estas eldonita serio da vidaĵoj-pk. de Aŭstralio kun esperanta teksto.

Korespondajoj.

Tomaszów lubelski.

Marde, la 21. okazis unua ĝenerala kunveno de ĉi-tiea filio de P. E. S., iniciatita kaj organizita de nia fervora samideano S-ro Ŝyflinger. Alvenis preskaŭ tridek personoj, el kiuj la plejmulto aliĝis jam al nia S-to. Al komitato apartenas S-ro D-ro Zawadzki, kiel prezidanto, S-ro Ŝyflinger, vic-prez. S-ino Sobol, S-roj Kulczyński kaj Asja komitatanoj.

10—Vo.

En Ivangrado de 8-a Oktobro en loka muzika societo estis aranĝita vespero, kie inter deklamoj kaj verkoj muzikaj D-ro Sochacki eldiris mallongan prelegon pri Esperanto. Malgraŭ tio ke la temo ne estis konforma kun enhavo de la vespero ĉeestintoj el diversaj profesioj kaj sociaj klasoj, aŭskultis prelegon kun granda intereso kaj dankis al preleginto per longe daŭraj aplaŭdoj.

Aso.

Bibliografio.

Esperanto. Kursa Lernolibro. Laŭ praktika parola metodo de Edmond Privat. Universala Esperantia Librejo. 10 rue de la Bourse, Genève, Svislando. Paĝoj 64. Prezo Sm. 0.20.

La agemeco de s-ro Privat sur diversaj kampoj de Esperanto kiel propagandisto, literaturisto kaj instruisto estas vere admirinda. Lia lasta Kursa Lernolibro, estas verko, kiun oni povas trankvile rekomendi, ĉar la aŭtoro prilaboris ĝin ne laŭ ia teoria plano ne elpruvita, sed sekvante sian longjaran praktikon kaj sperton de instruisto. Por ne troŝargi la lernanton per nova vortmaterialo, s-ro P. ne trorapidas en sia prelegado. Li dividis ĝin en 50 lecionojn, kaj dank' al la multaj buŝaj ekzercoj li donas al la instruatoj fine tion, kion promesas la antaŭparolo, t. e. la kapablecon de flua parolado. Ni konsentas kun la aŭtoro, ke lia praktika kaj malkara Lernolibro povos utile esti aplikata en Esperanto kursoj de ĉiuj landoj.

Statuto de l' Instituto d'Esperanto (Liguria Instituto de Esperanto) Approvato nell' Adunanza de l' 24 a de Nov 1912. Regularo de la Liguria Instituto de Esperanto en Genova.

Celo de la Instituto estas instruo de lingvo Esperanto kaj kreado de novaj instruistoj pri ĝi por favori la agadon de la liguriaj Esperanto-Societoj. Pluaj artikoloj priparolas la kursojn: elementan, konversacian kaj superan kaj la aranĝadon de ekzamenoj. La nomaro de l' komitatanoj kaj instruistoj garantias al ni energian agadon por la disvastigo de Esperanto en Italujo.

Dr. A. Stamatiadis. La Internacia helpa lingvo en 30 lecionoj. Aprobata de la ŝtata administracio de la insulo Samos por uzado en lernejoj. (Titolo nur greklingva). Samos 1912. Paĝ. 80. Prezo Sm. 0.50.

Dr. A. Stamatiadis. Vortaro Greka-esperanta kaj Esperanto-greka. (Titolo greka kaj esperanta). Samos 1914. Paĝ. XX + 460. Prezo Sm. 2 (Dr. 5). Havebla ĉe s-ro I. Kollaro, librovendisto en Ateno (Greklando), strato de Stadio № 44.

Dr. Stamatiadis, la meritoplena energia apostolo de nia afero en sia progresema insula patrujo, kronis sian laboradon per du gravaj fundamentaj verkoj, pro kiuj ni lin sincere povas gratuli.

La vasta gramatiko kun ekzercaro kaj la plena vortaro, kiuj ambaŭ postulis grandegan laboron, estas modele prilaboritaj kaj certe multe helpas al plua disvastigado de Esperanto inter greklingvanoj.

Studo per Ludo. Kvartet-ludo por amuzo kaj por lernigi la konversacion en Esperanto. Ader u. Borel. Esperanto—Verlag. Dresden — A. 1. Struvesstrasse 40. Prezo M. 1.25 (afranko 10 pfg.) eksterlanden Sm. 0.700.

Jen bonega ideo, ludante lernigi la lingvon. La Studo per Ludo konsistas el 100 kartoĵoj kun 100 zorgeme elektitaj frazetoj de la ĉiutaga vivo. Aldonita regularo priskribas la uzadon de tiu ĉi interesa societa ludo en rondo de laŭvola nombro da ludantoj. **Q.**

Respondoj de la Redakcio.

Al s-ro Birdo. Ni dankas kaj urĝe atendas daŭrigon.

Al s-ro Blotnik. La albumon ni sendas al Vi.

Al s-ro F. Lotto. Ĉiumonate regule ni sendas al Vi la numerojn; regule ĉiumonate Vi ilin ne ricevas. Kion do Vi konsilas al ni

fari? Ni lastfoje sendas al Vi la numeron duafoje.

Al multaj. La albumoj de Krakova Kongreso estas riceveblaj en nia Administracio po 4 S.

== ABONU ==
Amerikan Esperantiston

WASHINGTON, D. C., USONO.

La sola Esp. gazeto en Usono, kaj unu el la plej bonaj en la Esp. mondo. Redaktita en Esp. kaj angla
Jaro: Sm. 2.50; unu ekzemplero, Sm. 0.20.
Abonebla pere de nia Administracio.

German-Austria Esperantisto

Wien, VI, Dürergasse, 19.

Oficiala organo de la „Ligo de germanlingvaj esperantistaj grupoj en Aŭstrio“, kaj „Provinca Ligo de germanaj Esperantistoj en Bohemio“.

Jara abono: Sm. 1.25.

Brazila Esperantisto

Oficiala monata organo de „Brazila Ligo Esperantista“

Redakcio—Avenida Rio Branco, 153—2.—Rio de Janeiro, *Brazill.*
Jarabono: Eksterlanden: 2 Sm.

Ĉiu ukraina esperantisto nepre devas aboni la solan esperantan organon en la Ukrainujo.

UKRAINA STELO

monata, riĉe ilustrata, 16-paĝa literatura, informa kaj propaganda jurnalo. Jara abono: en Aŭstrio 3 K. Eksterlanden 1 Sm. 4000 S. Specimeno kontraŭ respondkupono. Redakcio: O. Kuzma, Kolomea, 360 Nova, Aŭstrio—Galicio.

B. KOTZIN
Historio kaj teorio de Ido
«Esperanto kripligita»

Kun antaŭparolo de R. Brandt, profesoro - lingvisto de Moskva Universitato.

VII + 144 paĝoj

Prezo 50 kop. (Sm. 0,53)

Afr. 58 kop. (aŭ ses respondkuponoj)

Aĉetebla ĉe Moskva librejo „Esperanto“.

Lubjanski pr. 3.

D-ro Zamenhof skribis al la aŭtoro: „Vian libron *Historio kaj teorio de Ido* mi legis kun intereso. La diligente dokumentita libro estas verkita tre bone kaj sendube estos tre utila

Ĉiu vera esperantisto devas koni la libron

Historio de Esperanto

1887 — 1912 j.

D E L. A D A M

(Adam Zakrzewski)

La verko premiita en la literaturaj konkursoj de VII Antverpena Kongreso.

La prezo 0.80 Sm., Kun. trasenso rekom. 0.95 Sm.

Ricevebla en Administracio de Pola Esperantisto.

Kuracisto

Internacia Medicina Monata Revuo. Unika Kuracista Gazeto Tute en Esperanto. Ĉiumonate Oficialaj Komunikajoj de la T. E. K. A.

Jarabono: Sm 3. Por T. E. K. A. — anoj — senpage.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio:

Varsovio, str. Szopena N. 1, Redaktoro: D-ro Ludwik Chybczyński.

Germana Esperantisto

Ĉiumonata gazeto por la disvastigo de la lingvo Esperanto apers en du eldonoj, alterne nate alternas.

Eldeno A celas la propagandon por Esperanto.

Eldeno B, estas pure literatura.

Jara abonprezo por Germanujo kaj Aŭstrio-Hungarujo 4 M. (2 Sm.), por ĉiuj aliaj landoj 2.250 Sm.

Lalijdeziere oni povas aparte aboni ĉiun el ambaŭ tute sendependaj eldonoj por la duono de la supre montritaj prezoj.

Ader & Borel, Dresden—A 1, Struvesstr. 40.

Kataluna Esperantisto.

Ĉiumonata gazeto, organo de la „Kataluna Esperantista Federacio.“

(50 societoj—pli ol 500 individuaj membroj.)

Sek. de Red.: Joseph Grau. Redaktoro: Fred. Pujolà
Kotizajo 4. fr. (1.600 Sm.)

Adreso: str. Gracia 12, Sabadell-Katalunujo.

LA REVUO

Internacia monata, literatura Revuo kun la konstanta kunlaborado de

D-ro L. L. Zamenhof

Literaturaj verkoj.—Teatraj verketoj.—Poezloj.—Informoj.—Internacia vivo. Unu numero: 0 fr. 50 (0 Sm. 200), Abono: por Francujo 6 fr.—Por aliaj landoj: 2 Sm. 800, Oni abonas ĉe Hachette kaj K-o, 79, boulevard St.

Germain, Paris, kaj ĝiaj korespondantoj.

The British Esperantist

VIII-a jaro. — Mondkonata pro sia pura stilo en literaturo! Aperas ĉiumonate!

Speciale redaktita fakto pri Tutmonda Kroniko
Jarabono: Fr. 4 (1,50 Sm.).

Adreso:

Museum Station Buildings 133—136, Figh Holborn, London.

Rekomendindaj verkoj.

Ondino. Romano de Motte-Fouqué, el germ lingvo trad. K. Myslik. Prezo Sm. 0.500.

La Verda Kakatuo, de A. Schröder el germ lingvo trad. Ioh Schröder Prezo Sm. 0.750.

Poezilaĵoj de Fr. Schiller, el germ. lingvo trad. Kolonelo Zwach (Nova Bibl. N. 1.) Prezo Sm. 0.250.

Mendeblaj ĉe Pola Esperantisto.

OFICIALA

Gazeto - Esperantista

Organo de la lingva komitato, de la konstanta komitato de la kongresoj kaj de la internacia konsilantaro

Unu numero Sm. 0.200. Jara abono: Sm. 2.—

Redaktejo kaj Administrejo: 51, rue de Clichy, Paris

„LA ONDO DE ESPERANTO.“

MONATA ILUSTRAC REVUO

Moskvo, Lubjanski pr. 3.

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj „Princo Serebjanij“, kies prezo por ne-abonantoj estas Sm. 1,60 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913, — krom 12 n-roj de l'gazeto, — senpage ricevos donaco belan Esper libron:

„ORIENTA ALMANAKO“

el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p. k. t. p.

La abonpago (2 rubl. = 2,120 sm).

Oni povas aboni „La Ondon“ pere de nia Administracio, Sopena 8, Varsovio.

Scienca Gazeto.

Internacia monata revuo pri scienco kaj industrio

Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperancista.

Jarabono — 3 Sm.

Eldonejo: Hachette & K^o, 79, Boulevard St.-Germain, Paris.

Riceveblaj en Administracio de Pola Esperantisto:

„Antaŭen kun Kredo!“

Literatura Jarlibro de „P. E.“ por 1911 jaro. La prezo de bela 200 paĝa volumo estas: por abonantoj de „P. E.“ 0,50 Sm. „ne-abonantoj 1,00 Sm.

La bela 200 paĝa volumo kun interesa kaj abunda enhavo, verkita en perfekta Esperanto devas troviĝi en biblioteko de ĉiu amanto de nia lingvo kaj literaturo.

SI, LA TRIA

Belega novelo de Henryk Sienkiewicz, tradukita de Antoni Grabowski

La prezo 50 kop.

LINGVO INTERNACIA

(fondita en jaro 1895)

Centra organo de la Esperantistoj, eliranta post la 15-de ĉiu monato.
Ĉiunumere 48 paĝoj. Formato 13 1/2 × 20 1/2 cm.;
Jara abono: 5 fr. (Sm 2).

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue Lecépède, Paris (Francujo).

La unua revuo Esperantista por la junularo JUNA ESPERANTISTO

Monata Gazeto ilustrata por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj. En „Juna Esperantisto“ troviĝas: diversaj rakontoj kaj noveloj por la junularo, fabeloj, poemoj, lingvaj ekzercoj, amuzajoj, problemoj, k. t. p.

La jaran abonon: 3 fr. (1,20 Sm) sendu al PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue Lecépède, Paris (Francujo).

Fearin Lactée Nestle

Nestle'a Infan-Faruno

enhavas plej bonegan svisan lakton.

LA NEĜO

Kvarakta dramo de St. Przybyszewski
(Pŝibyŝevski) trad. T. Ficovski.

La prezo 50 kop.

„Pekoj de l' Infaneco“

bela novelo de Bolesław Prus,
tradukita de Antoni Grabowski

Prezo 35 k. por abonantoj de „Pola Esper.“ 20 k.